Nikolaus Lenau,

# Aŭtuno

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mutiĝo kaj senkoloriĝo:
La vento flate min tuŝetas,
foliojn arboj nun demetas;
min ravas tiu formortiĝo.

Foriĝas de ĉi tie ĉio,
la amon oni jam forgesis,
la birdoj longe kanti ĉesis,
mallaŭte sinkas la folio.

La birdoj estas forflugintaj,
iliaj nestoj videbliĝas,
folioj lacaj subeniĝas
de branchoj senfoliiĝintaj.

En la arbara susurado
alblovas min sciigo iu,
ke estas formortiĝo ĉiu
sekreta, gaja nur ŝanĝado.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de* NIKOLAUS LENAU *(∗1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-628-1270 (2012-10-26 14:31:44)*